n-ro 82

oktobro 2003

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Novaj membroj bonvenaj

Tiu ĉi numero de La Merkato estas sendata ankaŭ al ne-membroj kiuj partoprenis IKEF-aranĝon dum la gotenburga UK. Aliĝo al la fakgrupo bonvenas. Kotizpago nuna (15 aŭ 10 EUR/USD, depende de la landokategorio) donas membrecon ĝis fino de la jaro 2004.

## Internaciaj pagoj en Eŭropa Unio nun malpli kostaj

En plejparto de la EU-landoj jam validas la regulo ke internaciaj bankpagoj (ene de EU) havas la saman tarifon kiel enlanda pago. Do verŝajne eblas malmultekoste pagi vian kotizon rekte al la kasisto. Nepre necesas uzi la internacian bankkontonumeron (IBAN) (por IKEF: BE14 0001 5926 2983) kaj la bankkodon (BIC, antaŭe SWIFT) (por IKEF: BPOTBEB1).

## Enhavo

IKEF adiaŭas du estraranojn . . . 3
Raporto pri la ĝenerala kunveno . . . 4-5
Vizito al komerca altlernejo en Gotenburgo . . . 6
Novaj membroj kaj adresoj - Peto el Mozambiko . . . 7
Detaloj de sinprezentoj dum la ĝenerala kunveno . . . 8-9
Komercaj petoj kaj proponoj . . . 10-11
Invest- kaj kunlaborpropono el Mongolio . . . 12

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef BRAUN, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)pandora.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**:
- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), telefono +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, retpoŝto istvan.gether(a)office.ksh.hu

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ http://users.pandora.be/ikef/

**IKEF adiaŭas du estraranojn**

En la Ĝenerala Kunveno de IKEF en Gotenburgo du ĝisnunaj estraranoj ne plu kandidatiĝis por reelekto kaj per tio eliĝis el la estraro: s-ro François Xavier GILBERT, Francio, kaj s-ro KÖNYVES Zoltán, Hungario.

Kun la membronumero 14, F.X. GILBERT (interna voknomo "Efikso") estis ne nur membro de nia fakgrupo sed ankaŭ estrarano de la unua tago. La fondokunveno okazis je 6 aŭgusto 1985 dum la UK en Aŭgsburgo. Do Efikso estis ĉi-jare estrarano de 18 jaroj. Jam de kelkaj jaroj emeriĝinta de sia posteno kiel direktoro en la Komerca Ĉambro de Bar le Duc, Francio, li vere meritas nun sian emeritiĝon ankaŭ de la IKEF-estraro.

En sia aktiva tempo li multon efektivigis por nia fakgrupo. Al tio apartenas ekzemple plurlingvaj (inkluzive Esperanto) eldonaĵoj de lia Ĉambro pri regiona varkatalogo kaj pri bonven-broŝuro. Plie li negocis ĉiam por ni kun ICC (Internacia Komerca Ĉambro, Parizo) por ricevi la rajton esperantigi termina-rojn kaj aliajn broŝurojn de ICC.

Krom por IKEF, Efikso ankaŭ multe laboris por aliaj esperantistaj instancoj, aparte por naciaj en Francio.

KÖNYVES Zoltán (membronumero 77) membriĝis en 1989. Profesie elektro-muntisto, li uzis la politikan turniĝon en Hungario en 1989 por krei propran entreprenon pri elektromuntado. En tiu pozicio li multe klopodis komerci esperantlingve.

La postenon de estrarano li transprenis en 1999 dum la Ĝenerala Kunveno en Berlino. Pro kialoj profesiaj (kresko de lia entrepreno) kaj familiaj (kvar adoleskaj filoj) li ne kapablis plu agadi en la estraro kaj petis esti senŝarĝita.



Ni dankas al ambaŭ sinjoroj pro ilia laboro en la estraro de IKEF.

Por la estraro: Franz Josef Braun, Prezidanto

## Ĝenerala Kunveno de IKEF dum Gotenburga Universala Kongreso

Je vendredo, 1 aŭgusto 2003, kunvenis la membroj de IKEF por sia jara ĝenerala kunveno. Ankaŭ aliaj interesitoj estis invititaj partopreni ĝin. Estis 25 ĉeestantoj. La oficialan parton gvidis Roland Rotsaert; la postan diskuton gvidis Rainer Kurz.

S-ro Braun, prezidanto, pro familiaj kialoj ne povis ĉeesti la kongreson, sed firme intencas esti en la venontjara kongreso en Ĉinio. Tamen, li anoncigis ke en 2004, post 19jara prezidanteco, li definitive retiriĝos. Ankaŭ estis senkulpigoj de s-roj Ciric, Gilbert, König kaj Könyves.

### Oficiala parto

La raportoj pri la jaro 2002, kiuj aperis en LM 80, estis unuanime aprobitaj.

Rainer Kurz prezentis la vidbendon kun intervjuo de Prof. Selten, kiun li iniciatis kaj al kiu ankaŭ kontribuis IKEF.

Kvar estraranoj atingis la finon de sia oficperiodo. Ooba kaj Rotsaert rekandidatiĝis kaj estis reelektitaj por periodo de du jaroj. Gilbert (pro aĝo) kaj Könyves (pro profesiaj kialoj) ne plu kandidatiĝis. Venis kandidatiĝo de Silvio Kniess Mates. Li rimarkigis sin dum la brazila universala kongreso de la pasinta jaro kaj lia vivpriskribo estis prezentita al la ĉeestantoj. Li estis unuanime elektita. La estraro nun konsistas el 6 personoj.

### Sinprezentoj

Poste membroj kaj ne-membroj havis eblon por mallonge prezenti siajn realigojn kaj projektojn:

- Rainer Kurz prezentis sian propran konsilant-firmaon Rainer Kurz Business Consulting (www.rkbc.de) kaj ofertis procentaĵon al IKEF-anoj kiuj rekomendas klientojn al li.

- Andrej Gregoriev prezentis www.inventions.ru, la centron de rusiaj inventaĵoj. Li ankaŭ dankis pro la eblo de simila prezento en viena komerca ĉambro, okaze de antaŭa kongreso, kiu konsiderinde helpis lin.

- Respondeculo de la esperanta feriejo/kunvenejo 'Grésillon' proponis ludonon de la ejo je 500 EUR por semajnfino aŭ 1000 EUR por semajno.

- João Otavio Veiga Rodrigues prezentis sian kafokomercon.

- Tamiko Kawakami prezentis sanigajn produktojn (k-link).

- Bent Holm nun vendas telefon- kaj aliajn servojn de Espertel en okcidenta kaj meza Eŭropo.

- E. Williger (www.dankon.com) estas komputila konsilanto kaj okupiĝas pri rezervado de interretadresoj kaj aldonaj servoj.

Ankaŭ estis antaŭviditaj sinprezentoj de Anne Tilmont (Nu Skin, finfine ne partoprenis en la UK) kaj de la firmao Bartos (kiu pro miskompreno havis samtempan prezentadon en alia ejo). Ĉiuj prezentantoj estis petataj sendi mallongan skizon de sia komerco por aperigo en La Merkato. (Vidu p. 8-9.)

### Ĝenerala diskuto

Inter la ĝeneralaj eroj citindas:

- Zoran Ciric (skribe) pledis por agadplano cele al pligrandigo de la membronombro.

- Zenovan Sabalys el Litovio dankis pro la traduko de la ICC-regularo pri dokumentaj kreditoj. Tia verko en lia lando eĉ ne ekzistas.

- Kees Ruig pledis por enmeti la tradician IKEF-viziton al komerca ĉambro aŭ simila en la oficialan UK-programon. Tiel ĝi havus multe pli grandan efikon ĉe la kongresanoj kaj ĉe la vizitata instanco. Li referencis por tio al la aranĝo en Roterdamo, kiu ankoraŭ nun estas memorata tie.

- Michael Cwik pledis por pli aktiva terminologia aktiveco de IKEF. Sen ekzisto de taŭgaj terminaroj ja ne eblas prezenti Esperanton al Eŭropa Komisiono. Bedaŭrinde neniu anoncis sin por okupiĝi pri tia temporaba kaj malfacila laboro. Pri la temo estas raporto je users.pandora.be/ikef/rap-uk03.html.



**Vizito al komerca altlernejo de Gotenburgo (www.handels.gu.se)**

25 personoj, membroj de IKEF kaj interesitoj, je mardo 29 julio 2003 posttagmeze vizitis la komercan altlernejon, parton de la Universitato de Gotenburgo.

Ili estis akceptitaj de Bo Sandelin, profesoro de tiu lernejo kaj membro de IKEF.

Prof. Sandelin unue skizis la historion de la altlernejo. La origino de la universitato reiras al la jaro 1891. Origine, komerca edukado striktasence ne okazis en la universitato, sed en 1923 establiĝis sendependa komerca altlernejo. Ĉiam estis intimaj rilatoj kun la Gotenburga Universitato. Komence de la sepdekaj jaroj la komerca altlernejo estis tute integrita en la universitato, sed en 1986 ĝi rericevis sian propran nomon.

La altlernejo havas 4700 registritajn studentojn. La universitato entute havas 40.000, el kiuj 66 % inaj. Proksimume duono de la doktoriĝantoj pri ekonomiko venas el eksterlando.

Principe la instruado estas senkosta. Tamen, eblas ke entreprenoj 'aĉetas' kursojn.

Poste prof. Sandelin skizis la svedan ekonomion, komparante ĝin kun tiu de la Eŭropa Unio.

En 2000 la sveda BNP estis 3 % de la EUa, proksimume same granda kiel la belga. Se oni donas al la popersona BNP por tuta EU indekson 100, tiam Svedio havas 102 (kompare: Belgio 111, Luksemburgo 190, Danio 120, Hispanio 81, Ĉeĥio 59, Pollando 39).

De la sveda BNP 2 % rilatas al agrikulturo (+ fiŝkaptado kaj arbokulturo), 28 % al industrio kaj 70 % al servoj (inkluzive de ŝtata administrado).

**Pliaj raportoj (terminologio, ĵurnalismo...)**

legeblas je users.pandora.be/ikef/rap-uk03.html kaj en la rubriko 'Aktuale' de www.ikef.org. (rr)



**Novaj membroj**

326. S-ro Walter Ŝverko, Silva Milenića 41, HR-51000 RIJEKA, Kroatio
327. S-ro Sergeo DEREVIANNIJKH, Trudovaja 12-26, RU-14281 IVAN-TEEKVA, MOSKVA, Rusio, rete sergie2002(a)mail.ru
328. S-ino Tamiko KAWAKAMI, Oreliveien 1 A, NO-0580 OSLO, Norvegio
329. S-ro Miĥail ĈERTILOV, p.f. 21, RU-143006 MOSKVA-ODINCOVO, Rusio, rete esperanto(a)email.ru

**Nova retadreso**

163. S-ro CAO Xionglin, Ĉinio, venkon(a)163.com

**Korekto de adreso**

(kelkaj etaj ŝanĝoj kompare kun la membrolisto sendita kun lm81):

73. LEE Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, TAE-GU, Koreio 706-031

En la listo la membro 308 Miloŝevic estu sub Kroatio!

**Mozambiko**

Por afrika projekto de sociala ekonomio (pentrado) estas serĉataj jenaj materialoj:

- kolorŝmiradoj
- skatolopenikoj
- blankaj ŝtofoj
- rismo da paperoj
- matematikaj skatoloj
- krajonoj
- gumoj
- planketoj
- ktp.

Sendu al: ASSANIU BINDUKU Sirilo, Maratane Rifuĝejo, KLU-LU-P -

MOCAMBIKO, c/o UNHCR/ACNUR, P.O.Box 173, NAMPULA, Moçambique.



**Sinprezentoj dum la ĝenerala kunveno: jen pli detalaj informoj**

**RKBC**

Rainer Kurz el Stuttgart/Germanio (rk(a)rkbc.de) estas memstara firmaokonsilisto. Lia konsilentrepreno 'Rainer Kurz Business Consulting' gvidas konsilprojektojn por teknologifirmaoj, inter ili monde gvidaj firmaoj kiel Deutsche Telekom, France Telecom, General Motors kaj Lucent Technologies. Liaj konsilprojektoj ĉefe temas pri ekonomia kaj organiza konsilo, projektmastrumado kaj entreprenaj strategioj. Antaŭ la fondiĝo de sia firmao, li laboris por internaciaj elstaraj konsilfirmaoj kiel McKinsey kaj Gemini Consulting. Pliaj informoj estas haveblaj ĉe www.rkbc.de aŭ post skribo al info(a)rkbc.de. IKEF-membroj, kiu helpas starigi kontaktojn por konsilprojekto povas ricevi procentaĵon.

**Sponsorprogramo**

Ni peras por fidinda firmao (34 merkatoj inkl. de Ĉinujo), kun pluraj fortaj divizioj en kreskantaj merkatoj. Ni malkovris ke estas fortaj eblaj ligoj kun la kosmopolita esperantistaro.

Eblas akiri kroman monrimedon (ankaŭ por E-Asocioj), anstataŭi plentempan postenon aŭ fari altnivelan merkatadon kun plej altaj enspezoj. Investoj ne necesas.

Petu informojn, interretan enkondukon kaj eĉ trejnadon ĉe Anne Tilmont, tel. 00 32 67/63 79 74, anne(a)esperanto.be. Informoj ankaŭ ĉe Paul Peeraerts, direktoro de la Esperanto Centro Antverpeno.

**www.dankon.com** (E. Williger)

Dum almenaŭ 20 jaroj mi estas komputila konsilisto. Antaŭe mi multe laboris pri programado, sed post la eksplodo de la interreto mi pli kaj pli lernis kaj faris:

- kreadon de ret-paĝaroj
- ret-poŝtejojn
- gastigadon de domajnaj nomoj
- administradon de serviloj

- interligadon de retoj

- kaj nun registradon de nomoj mem.

Dankon.com komencis pro oportuno registri domajnajn (interretajn) nomojn sufiĉe malaltkoste kaj mi deziris ke estu esperanta versio. Mi fakte revendas la nomojn pere de GoDaddy.com kiu estas unu el la plej grandaj komercoj kiuj registras nomojn. Bonŝance, ili estas honestaj (mi havas spertojn kun alia kiu neniam pagis min) kaj mi povas vendi por malpli ol ili mem faras. Po 1 USD mi gajnas por ĉiu nomo, kaj do mi ne riĉiĝos baldaŭ. Sed mi ankaŭ ne perdas monon. Rigardu je www.Dankon.com aŭ skribu al dankon(a)dankon.com.

**Kafo**

Unue mi bezonas paroli pri la prezoj de kafo. Fakte, antaŭ doni la prezojn pri kafo estas necese ke ni akordiĝos pri la dezirata kvalito kaj pri la dezirata tipo de kafo. La entrepreno – Kafa Komerca Sanktaj Koroj Ltda. – komercas kafon de tipo 17/18 (kribrilo), do kun grandaj grajnoj, kaj de tipo 14/16, kun grajnoj malgrandaj, sed ambaŭ je sama kvalito, de 'malmola', rafinita trinkaĵo.

Kiam oni vendas kafon, la vendado okazas ekde almenaŭ unu kontenero. La prezo estos tipo FOB, tio estas, kun la varoj metataj en la haveno (Santos/BR). Aŭ ni povos doni la prezojn inkluzivantajn la asekuron, frajtadon (ŝarĝotransporton), sed tiam ni bezonos scii al kiu haveno la interesito deziros la sendon.

Ni povos sendi specimenon de grajnaj nerostitaj kafoj por via elekto. Sufiĉas havigi la adreson.

Pri la eksportado de rostita kafo, ĝi nur nun komenciĝas en nia lando, kaj ni povos vendi tiun ĉi varon, sed la prezo altas kaj la kvalito de la varo dependos de la pakumo (vakuen por ŝirmi la kvaliton). Se vi decidos pri rostita kafo ni povos doni la prezon pri ĝi.

Mi estas al via dispono por klarigi iujn ajn detalojn pri la kafa afero.



João Otávio Veiga Rodrigues, Rua Alvarina Frota nº 214 – Jd. Santa Luíza - Varginha – MG – Brasil – CEP: 37026-670, tel. (021(35)3214-2800 - fakso 021(35)9102-9856 - retpoŝto bluacielo(a)bol.com.br

## **Komercaj petoj kaj proponoj**

**Ĉeĥio**

Elektraj diskondukiloj kaj ekfunkciigoj por ĉerpiloj kaj motoroj, fotovoltaj sistemoj, elektraj drenaĵpumpoj kaj similaj produktoj laŭ la eŭropa normo. Produktas kaj liveras firmao MANIERO ELETTRO en urbo OLOMOUC, Ĉeĥa Respubliko, rete: bretislav1(a)post.cz, bretislav2(a)centrum.cz, poŝte Bretislav Nevrly, Svermova 1, 772 00 OLOMOUC, Ĉeĥio.

**Ĉinio**

Esperantisto fondis tekstilan fabrikon (400 laboristoj) kaj volas kunlabori kun esperantistoj en tuta mondo por vendi la produktaĵojn; ĉefe estas T- ĉemizoj. Kontaktu: Zaozhuang Xueyuan bei'an lu, Zaozhuang, Shandong, Ĉinio CN-277100, semio1(a)sohu.com aŭ semio1(a)sina.com.

'Instituto de Xi'an-urba Administracio de Industrio kaj Komerco' kaj 'Instituto de Xi'an-urba Administracio por Imposta Afero' en Zaozhuang, volas kontakti similajn institutojn aŭ administraciojn helpe de esperantistoj por interŝanĝi informojn kaj spertojn, plie interviziti unu al aliaj.
Xi'an situas centre de Ĉinio, estas tradicia ĉefurbo de antikva Ĉinio, kaj nun havas pli ol 6,2 milionojn da loĝantoj. Laŭ ĉina sistemo Xi'an-a Esperanto-Asocio kaj la superaj institutoj apartenas al sama ligo por soci-sciencaj asocioj kaj institutoj. Kun ili ni havas tre intiman rilaton. Pro tio ili petas nian helpon por internacia kunlaboro.
S-ro WANG Tianyi, ĉina peranto de IKEF, prezidanto de Xi'an-a Esperanto-Asocio, adreso: Jian-Gong-Lu 8,710043 Xi'an, Ĉinio; Tel.+86-29-2242215, informo(a)komerco.com, esp(a)pub.xaonline.com, komerco(a)public.xa.sn.cn.

**Kongo**

Lubumbashia Esperanto Asocio, luespas(a)yahoo.fr, deziras korespondi kun



vendisto de ŝuoj en via lando. Ĉu vi povas helpi nin, serĉante komercistojn, kiuj povas korespondi kun ni tiu-cele?

Mi nomiĝas Jean-pie Matindi Luntadila. Mi estas komercisto pri diversaj varoj, kuracsmedikamentoj, kosmetikaĵoj ktp. Mi deziras kunlabori kun aliaj komercistoj ĉie en la mondo por reprezenti ilin en mia lando.
Jen mia loĝadreso: Av. moanda 22, Quartier 5, Lukala, Bas Congo, tel. 0815196752, rete jpiemat(a)yahoo.fr.

**Koreio**

Korea fama kontakto-lensa (por okuloj) kompanio Migwang (www.mi-kwang.com/new/english/products.html) serĉas agentejojn tra la mondo. Tiuj, kiuj volas fariĝi agento de la kompanio Migwang, bonvole turnu sin al LEE Mun-ki, Seulo, lmkes(a)hanmail.net.

**Niĝerio**

La niĝeria registaro deziras komercigi la ŝtatajn kompaniojn kaj serĉas fremdajn investantojn kiuj interesiĝas pri aĉeto de tiaj kompanioj. Mi faras ĉi-anoncon kaze ke estas esperantistoj kiuj ŝatas investi en Niĝerio. Turnu al vin al al TTT-ejo de la registara respondulo: www.bpeng.com aŭ kontaktu min: Segun Emmanuel, seglad2002(a)yahoo.com. Mi certigas ke la registaro nun serioze kontraŭbatalas la fiajn proponojn kiuj ŝajnigas deveni el Niĝerio.

**Ĉino en Sudameriko** (de: "Info-esperanto" esperanto(a)fibertel.com.ar)

Vizitis Buenos Aires, s-no James Zheng, esperantisto kaj ĉina komercisto. Li reprezentas ĉinan entreprenon kun oficejoj en Buenos Aires. Li estis ankaŭ en Kordobo, en kontakto tie kun nia s-no Emmanuel Arias. Tre agrabla persono; li invitis nin vojaĝi al venonta UK en Pekino, kie li pretas esti nia gastiganto. Pro manko de tempo ni ne povis ricevi lin en nia sidejo, sed s-ino Silvia Rottenberg kaj edzo Karlos, nome de AEL kaj BEA invitis lin je sia hejmo kaj akompanis lin en vizito tra la urbo, al ĉina Kvartalo de 'Barrankas de Belgrano' kaj por

danci 'tangon'... Li estis tre kontenta kaj multe ŝatis nian landon kaj la urbon, kien li esperas reveni estontece, ankaŭ por vizito al Patagonio. Hodiaŭ matene li flugis al Kolombio. Ni restos en kontakto pere de la reto. (informis RoSartor)

**Invest- kaj kunlaborpropono el Mongolio**

Ĉi-somere, Mongola Esperanto-Societo akiris al si rajton gvidi malgrandan kolegion pri financo kaj kulturologio, surbaze de kontrakto kiun subskribis posedanto de la kolegio kaj mi nome de la Societo. Tiu-ĉi kolegio estis fondita laŭ oficiala permeso de la Ministro pri edukado, kulturo kaj sciencoj, en 2001 jaro.

Bedaŭrinde la posedanto ne povis gvidi kaj funkciigi ĝin ekde 2002 jaro. La gestudintoj nun studas en aliaj kolegioj. La posedanto ne havas eblecon plu funkciigi lian kolegion pro financa stato. Tial li ne kontraŭas kunposedi licencon de la kolegio kun iu, kiu finance subtenos. Kaj li eĉ permesas transdoni la licencon al la subtenonto.

Pro tio nia societo serĉas investonton. Estus agrable se vi helpus nin por kontakti iun investonton el via lando. Kvankam nun en Mongolio estas preskaŭ 100 kolegioj, nur malmultaj el ili bone funkcias krom ŝtataj universitatoj kaj kolegioj. Ni konsideras, ke en tiu situacio ni povos plialtigi aŭtoritaton de nia kolegio en proksimaj 5-6 jaroj.

Samtempe en nia lando funkcias multaj kunaj kaj fremdaj kolegioj, sed iliaj agadoj estas en komenca etapo. Ĝenerale privataj lernejoj estis fonditaj ekde 1991 jaro.

Ni intencas ekfunkciigi nian kolegion en ĉia okazo. Kvankam ni havas oficialan permeson aliĝigi 100 studentojn, ĉi-jare ni aliĝigos 50. Se ni bone funkciigos la kolegion, laŭ nia opinio, ĝi ludos gravan rolon por disvastigi kaj efikigi agadon de nia societo. Almenaŭ ĉiujare multiĝus nombro de mongolaj esperantistoj.



Por ekfunkciigi la kolegion, en proksimaj jaroj ni luos kelkajn ĉambrojn de alia privata kolegio. Sed la kolegio proponas al ni ke aĉetu unu korpuson (270 m²; duetaĝa) de konstruaĵo de sia kolegio, je 100.000.000 tugrikoj (1USD=1151 MNT), anstataŭ lui.

Ch. Enkhee, estrarano pri edukado de MES, pacosuno(a)magicnet.mn